

# Flandra Esperanto-Ligo

# KATALOGO

## 2021


























# MENDOJ, RABATOJ KAJ PAGOJ

La eroj el tiu ĉi katalogo estas mendeblaj ĉe ĉiuj bonaj libroservoj, kiel UEA, JEI, Espéranto-France kaj Esperanto-Buchversand. Vi povas mendi ilin ankaŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, B-2060 Antwerpen.
☎ + 32 3 234 34 00 🖳 butiko@fel.esperanto.be
aŭ prefere pere de la Retbutiko: www.retbutiko.be

De personoj kiuj havas **konton ĉe FEL** kun sufiĉa bonhavo por pagi la mendon, FEL subtrahos la kostojn de ilia konto. La aliaj personoj ricevos fakturon kun mencio de la diversaj pagmanieroj. Se vi loĝas en EUR-lando, prefere ĝiru monon al jena banko-konto de Flandra Esperanto-Ligo: IBAN BE66 0000 2653 3843 BIC BPOTBEB1.

Personoj kiuj posedas **kreditkarton** de Mastercard, Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Access povas mendi rekte ĉe FEL citante la numeron de la karto, la valido-daton kaj la 3 kontrolciferojn (kiuj estas troveblaj dorse de la karto). La UEA-konto de FEL estas fela-x. Pagi per PayPal eblas al financo@fel.esperanto.be

Rekonitaj libroservoj ricevos la kutimajn rabatojn mendante rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo tri ekzemplerojn aŭ pli de la sama ero. La precizan rabaton eblas trovi en <www.retbutiko.be> aŭ oni povas demandi al <retbutiko@fel.esperanto.be>.

**ĈIUJ PREZOJ ESTAS INDIKITAJ EN EŬROJ. AL ĈIUJ SUMOJ ALDONIĜAS LA AFRANKO.**

Flandra Esperanto-Ligo

# PROZO

## Amo inter ruinoj (Trevor Steele)





En 1990-1991 Sovetio estis malsana politika organismo. Ĉiuj estis malkontentaj, ĉiuj deziris ŝanĝon. Travis, aŭstraliano, iras al tiu landego serĉante amon, sed suferas grandan seniluziiĝon. Virve, estonino, enamiĝas al ĉarma litovo, sed ankaŭ ŝi spertas amaran perdon. Ĉe Esperanto-kongreso Travis kaj Virve amikiĝas. Ĉu ili povos trovi feliĉon kune malgraŭ ĉiaj obstakloj?

Paĝoj: 232; 20,5 cm; bindita; 2016.
ISBN 978 90 77066 55 3

**Prezo: 16,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 8,41 eŭroj**

## Aventuro en mondo de ŝajnigado (Jean Codjo)




La Benina aŭtoro rakontis siajn spertojn ke diplomo havas varian prezon kaj gravecon, laŭ la lando kie oni ĝin akiris, laŭ la vizaĝo aŭ la koloro de la diplomito. Iusence la nova novelo rolas kiel ŝlosilo al la antaŭuloj (Dialogo inter surduloj kaj La paŝo senelirejen).

Paĝoj: 44; 20,5 cm; vinktita; 2009.
ISBN 978 90 77066 42 3

**Prezo: 6,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,00 eŭroj**

## Briĝo kun veneno (Ronald Cecil Gates)




Tiu ĉi rakonto estas la kvina en serio da murdenigmoj, en kiuj ĉefrolas detektivkomisaro Roberto Elis kaj universitata gardisto Petro Tomson. Temas ĉifoje pri hommortigo okazinta dum kunveno de la loka briĝa klubo. La viktimo estas la prezidanto de la klubo kaj profesoro pri filozofio en la universitato.

Paĝoj: 92; 20,5 cm; vinktita; 2014.
ISBN 978 90 7706 65 15

**Prezo: 7,49 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5 eŭroj**

## Cecilja. Tri poetaj romanetoj (Felix Timmermans) - tradukis Lode Dores, Pierre Anselme, Eugeen Paesmans




Jen tri perletoj de la flandra literaturo: *Ceciljan mi vidis veni* estas proza poemo, idilio kun tragika fino, melankolia romanco. En *La tre belaj horoj de Fraŭlino Simforoza, begineto* la juna begineto Simforoza enamiĝas al la ĝardenisto Marteno, kiu poste iĝas monaĥo. *Kristnaska Triptiko* estas vera juvelo pro sia naiva, pia priskribo.

Paĝoj: 106; ilustrita; 20,5 cm; kudre bindita; 2000.
ISBN 90 71205 81 9

**Prezo: 12,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 6,30 eŭroj**

# PROZO


## Ĉu rakonti novele? (Johán Valano)




Deko da krimnoveloj de tiu ĉi fama aŭtoro.
1986.
Serio Stafeto, n-ro 1; ISBN 90 71205 60 6

**NUR**
**kiel bitlibro: 5,00 eŭroj**

## Dialogo inter surduloj (Jean Codjo)




Dua verko de Benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas, sed ne aŭdas...
Paĝoj: 52; 20,5 cm; vinktita; 2007.
ISBN 90 77066 26 8

**Prezo: 6,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,00 eŭroj**


## Dio ne havas eklezion (Trevor Steele)




Bruce Golding, internacie konata foto-ĵurnalisto vizitas batalarenojn kaj lokojn de naturkatastrofoj. Sur Hakilule, insulo grandparte detruita de cunamo, li ekscias, ke senkrupula korpoarcio volas konverti la insulon en feriejon por riĉegaj turistoj, tiel detruante la vivstilon de la pacemaj insulanoj.
Paĝoj: 168; 20,5 cm; glubindita; 2015
Serio Stafeto, n-ro 38; ISBN 978 9077066 54 6.

**Prezo: 11,40 eŭroj**
**kiel bitlibro: 6,05 eŭroj**

## Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ (Adriaan Roland Holst) - tradukis Christian Declerck





Mallonga romano inspirita de keltaj elementoj, kiu disvolviĝas en Irlando. Perleto sur la krono de la nederlanda literaturo.

Paĝoj: 52; 20,5 cm; vinktita; 1988.
Serio Stafeto, n-ro 8; ISBN 90 71205 24 X.

**Prezo: 5,00 eŭroj**

# PROZO

## Dormanta hejmaro (Manashi Dasgupta)




En la romano, originale verkita en la bengala, la nord-bengala urbeto Nakshalbari lanĉis gerilan movadon de kamparanoj subpremegataj de la ŝtata aparato. Ŝontu, la filo sentema adoleska de mense malsana patro kaj memcentra patrino partoprenas al tiu movado.
Paĝoj: 240; 20,5 cm; kudre bindita; 2006.
Serio Stafeto, n-ro 29; ISBN 90 77066 20 9

**Prezo: 16,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 8,40 eŭroj**

## Flugi kun kakatuoj (Trevor Steele)




En la brita kolonio Okcidenta Aŭstralio amikiĝas Billy Dixon, naiva juna angla enmigrinto, kun Jangabara, multtalenta junulo de la tribo Banubi. Unue per perforto, poste per neperfortaj metodoj, Jangabar sukcesas haltigi la blankulan invadon. Kaj la afero finiĝos tragedie.
Paĝoj: 256; 20,5 cm; kudre bindita; 2010.
Serio Stafeto, n-ro 35; ISBN 978 90 77066 46 1

**Prezo: 16,50 eŭroj**
**kiel bitlibro: 8,70 eŭroj**

## La fotoalbumo fermiĝas (Trevor Steele)




La aŭtoro de la unuaj du volumoj de „La fotoalbumo” jam delonge mortis, sed deziris, ke la verko estu daŭrigota. Nun venas la „ferma” volumo pri la historio de familio O’Shea, verkita de homo luktanta kun mortiga malsano.
Paĝoj: 77; 20,5 cm; glubindita; 2019.
Serio Stafeto, n-ro 40; ISBN 978 9077 066 59 1

**Prezo: 7,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,00 eŭroj**

## La Grafo de Monte-Kristo (Alexandre Dumas) - tradukis Daniel Moirand





Ekde sia apero en 1844, tiu ĉefverko el la mondliteraturo (kiu kvalite superas La Tri Musketerojn) de A. Dumas ne ĉesis pasiigi la legantojn. Kluboj da admirantoj fondiĝis, kiuj atestas pri vigla intereso al A. Dumas, ĝenerale, kaj al La Grafo de Monte-Kristo aparte.
Parto 1 & 2 : ISBN 978 90 71205 43 0; ISBN 978 90 71205 44 7.
Paĝoj: 1184; 20,5 cm; kudre bindita; 2010

**Prezo: 79,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 28,00 eŭroj**

# PROZO

## Homoj de Putin (Kalle Kniivilä)




La politikisto Vladimir Putin sufokis la rusian demokration kaj detruis la sendependajn amaskomunikilojn, li sendis rusiajn trupojn en najbarajn landojn. Renat kaj Galina en malgranda urbo fore de Moskvo voĉdonis por Putin sed tiu lasta konscie turnis sian dorson al la meza klaso por proponi stabilecon al ordinaraj rusianoj.
Paĝoj: 168; 20,5 cm; kudre bindita; 2016.
ISBN 978 90 77066 52 2

Dua eldono

**Prezo: 15,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 7,90 eŭroj**

## Johano (K.J.K. Vroegop)




Johano. El la vivo de roterdama knabo estas la travivaĵoj de knabo dum la dua mondmilito. Amuza romaneto en facila lingvo. Rekomendita por komencantoj.
Paĝoj: 95; 20,5 cm; vinktita; 2001.
ISBN 90 71205 93 2.

**Prezo: 7,50 eŭroj**


## Kazinski venas tro malfrue (Deck Dorval)




Kial stabilanima kaj persistema viro, sukcesa inĝeniero, faras murdon? Kaj, se li decidas fari ĝin, ĉu li estos sufiĉe inĝenia, ĉu li ekzakte kalkulos siajn ŝancojn, elektos la rimedojn kaj zorge kaŝos la spurojn por fari murdon sen misoj, kaj tiel trompos la famkonatan inspektoron Ksavero Kant ?
Paĝoj: 176; 20,5 cm; kudre bindita; 1987.
Serio Stafeto, n-ro 3; ISBN 90 71205 18 5.

**Prezo: 5,50 eŭroj**

## Kobo (Ernest Claes) - tradukis Cor Bruins





Kobo estas la trista vivo de knabo el flandra Kampino, kiu kreskas en medio, kie la malriĉeco kaj la peza laboro igis la homojn sensentemaj kaj senamaj. Por eskapi tian vivon li eniras la monaĥejon kaj fariĝas Frato Jakobo. Post kvar monatoj li forlasas la monaĥejon kun la pura intenco helpi, fari bonon. Sed... la mondo estas malbona, la homoj estas malbonaj, tion li spertas serĉante la ĉielon kaj sian koron.
Paĝoj: 232; 20,5 cm; ilustrita; kudre bindita; 1999.
ISBN 90 71205 64 9.

**Prezo: 24,00 eŭroj**

# PROZO


## Kolera afero (Ronald Cecil Gates)




Mallonga krimromano de la aŭtoro de La septaga murdenigmo kaj Morto de sciencisto, en flua ĉiutaga Esperanto. Murdo okazis sur la tereno de granda aŭstralia universitato. Ĉu oni sukcesos solvi ĝin?
Paĝoj: 88; 20,5 cm; vinktita; 1993.
ISBN 90 71205 48 7.

**Prezo: 5,00 eŭroj**


## Konvinka kamuflaĵo (Trevor Steele)




Trevor Steele estas unu el la plej produktemaj aŭtoroj en Esperanto. Tiu ĉi aŭtobiografio prezentas serion da bildoj el la vivo de la aŭtoro kaj donas la fonon de lia verkado.
Paĝoj: 272; 20,5 cm; kudre bindita; 2014.
Serio Stafeto, n-ro 37; ISBN 978 90 77066 50 8

**Prezo: 19,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 10,10 eŭroj**

## Kromosomoj (Lorjak)




Ĉu murdinstinkto estas heredebla aŭ ne? Jen la ĉefa temo de tiu ĉi origi-nala romano. Sed ne prenu tion tro serioze... Lorjak ja iele estas disĉiplo de Schwartz, do certe enestas dozo da humuro!
Paĝoj: 156; 20,5 cm; kudre bindita; 1989.
Serio Stafeto, n-ro 10; ISBN 90 71205 26 6.

**Prezo: 5,00 eŭroj**
**NUR kiel bitlibro**

## Kronprincedzino (John Francis)





Vi deziras senti vin kavaliro? Vi bedaŭras, ke vi ne vivis en kastelo kun imponaj remparoj? Nova rakonto pri intrigoj, miskomprenoj kaj sekretaj bataloj en mezepoka etoso atendas vian legadon. La verko aperis kelkajn tagojn antaŭ la morto de la aŭtoro. Tamen John Francis neniam vidis sian lastan romanon. La libroj survojis al li en la poŝto, en la momento, kiam li forpasis.
Paĝoj: 189; 20,5 cm; vinktita; 2011.
ISBN 978 90 77066 47 8.

**Prezo: 16,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 8,40 eŭroj**

# PROZO

## Kvazaŭ ĉio dependus de mi  (Trevor Steele)




Tiu ĉi romano baziĝas grandparte sur la vivo de la ĵurnalisto kaj Nobel-premiito Carl von Ossietzky, unu el la fruaj viktimoj de la leviĝanta movado de Hitler kaj la plej fia reĝimo en la homa historio. La famkonata aŭtoro omaĝas Ossietzky kaj lian same brilan kunbatalanton Kurt Tucholsky.
Paĝoj: 344; 20,5 cm; glue bindita; 2009.
Serio Stafeto, n-ro 34; ISBN 978 90 77066 41 6.

**Prezo: 19,20 eŭroj**
**kiel bitlibro: 10.07 eŭroj**


## Kvin kverkoj kaj la sekvo  (Christian Declerck)




La aŭtoro mem skribas en sia enkonduko: “Mi nomas ĉi libron romano, sciante ke ĝi ne estas pure aŭ tute tio. Verki veran romanon kiel verkisto-rakontanto, kiom agrable tio ŝajnas al mi. Jes. Sed evidentas ke tion mi ne kapablas: mi miksis en mia fabulo tro da fremdaj elementoj: citaĵojn, listojn, dokumentojn, ideojn, longajn deviojn kaj ekzemplojn, biografiajn donitaĵojn. Nepras alinomi mian verkon. Ĉu dokumenta romano?”
Paĝoj: 372; 20,5 cm; glubindita; 2019.
Serio Stafeto, n-ro 42; ISBN 978 90770666 38.

**Prezo: 20,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 12,00 eŭroj**


## La migranta judo (August Vermeylen) - tradukis Christian Declerck




En ĉi tiu malgranda sed poezieca kaj esprimforta romano, la aŭtoro pakis la esencon de sia vivo kaj karaktero. La majstraĵo konsistas en tio, ke li abstraktas sian propran travivaĵon kaj rekonkretigas ĝin en konata historio, tiu de la Nazaretano.
Paĝoj: 72; 20,5 cm; vinktita; 2000.
ISBN 90 71205 90 8.

**Prezo: 8,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,00 eŭroj**

## Mortiga ekskurso  (Ronald Cecil Gates)




La kvara el serio da krimromanetoj, kies scenejo estas imagita provinca universitato en Aŭstralio. Grupo da studentoj faras ekskurson en la ŝtata praarbaro. Dum la pikniko ilia instruisto foriras inter la arboj kaj mortigatas. Sekvas serĉado por trovi la kulpulon.
Paĝoj: 112; 20,5 cm; glubindita; 2006.
ISBN 90 77066 23 3

**Prezo: 10,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,25 eŭroj**

# PROZO

## Morto de artisto (Anna Löwenstein)





Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon. La du junuloj amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo. De la sama aŭtorino aperis la sukcesa romano. La ŝtona urbo, jam kvarfoje eldonita!
Paĝoj: 624; 20,5 cm; kudre bindita; 2008.
Serio Stafeto, n-ro 33; ISBN 978 90 77066 39 3.

Kvara eldono

**Prezo: 20,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 10,50 eŭroj**


## Morto de sciencisto (Ronald Cecil Gates)




Krimromano en flua ĉiutaga Esperanto. Kiu ĉi-foje krimis en granda aŭstralia universitato? De kie tiom da akademiaj murdoj en Aŭstralio? Ronald Gates, emerita profesoro, gvidas vin tra la enketo. De la sama aŭtoro aperis ĉe FEL: La septaga murdenigmo, Mortiga ekskurso kaj Kolera afero.
Paĝoj: 88; 20,5 cm; vinktita; 1994.
ISBN 90 71205 55 X

**Prezo: 5,00 eŭroj**

## La muelilo de la fortuno (Ioan Slavici) - tradukis Lenke Szász




Ioan Slavici (1848 – 1925) estas klasikulo de la rumana literaturo. Ĉi tiu novelo aperis la unuan fojon en 1881. Ĝi estas majstroverko de Slavici, kiu per interesa rakonto kaj lerta psikanalizo ilustras la detruan efikon de la malmodereco kaj monavideco por la individuo. Slavici estis konvinkita moralisto, lia nekaŝita deziro estis moralinstrui la leganton.
Paĝoj: 160; ilustrita; 20,5 cm; glubindita; 2018.
ISBN 978 9077066 57 7

**Prezo: 11,40 eŭroj**
**kiel bitlibro: 6,00 eŭroj**

## Murdo en Esperantujo (Daniel Moirand)





Kviete fluetas la kluba vespero, kiam subite malfermiĝas la pordo kaj envenas nekonata viro. Kiam li atingas la tablon, li teren kolapsas. Morta! Pro tiu okazaĵo leŭtenanto William Hammerkopf eniras la Esperanto-mondon. Ĉu li trovos tie nur morton kaj pereon?
Paĝoj: 156; 20,5 cm; 1988.
ISBN 90 71205 20 7

**NUR**
**kiel bitlibro: 5,00 eŭroj**

# PROZO

## Murdo en la teatro (Ronald Cecil Gates)




Devas baldaŭ komenciĝi la fina prezentado de verko de loka dramisto; sed en sia kostuma ĉambro unu el la roluloj kuŝas mortigita. Tiel estas, ke la sesan fojon kunlaboras detektivkomisaro Roberto Elis kaj universitata gardisto Petro Tomson por solvi murdenigmon. Pluroblas tiuj, kiuj havis oportunon kaj eble motivon por okazigi la morton. Kiu el ili kulpas?
Paĝoj: 152; 20,5 cm; 2017.
ISBN 978 90 77066 51 5

**Prezo: 15,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 7,90 eŭroj**

## La muzeo de milito (Claudio Magris) - tradukis Carlo Minnaja




Triesto: Viro havas kiel vivcelon la kolektadon de ĉiaj ajn armiloj por giganta muzeo de milito. Ĝi devas iĝi kolekto de ĉiu malbono en la mondo, dum ekster la muzeo ekzistos nur paco. La kolektisto, tamen, mortas en misteraj cirkonstancoj, kaj tiel perdiĝas la parto de liaj notoj, kiuj enhavas la nomojn de la kunlaborantoj en la Rizejo, la koncentrejo de Triesto.
Paĝoj: 296; 20,5 cm; kudre bindita; 2019.
ISBN 978 90 77066 62 1

**Prezo: 35 eŭroj**

## La nekredebla aventuro de la misio Moresten' (Eric Coffinet)




"La nekredebla aventuro de la misio Moresten' " estas ukronia romano. Kiel la mondo aspektus nun, se Francisko-Ferdinando ne estus mortigita? Kaj, ĉu tio havus influon sur Esperanto? Verŝajne jes ja, ĉar la unua mondmilito forte bremsis la lingvon.
Paĝoj: 136; 20,5 cm; glubindita; 2020.
ISBN 978 90 77066 69 0

**Aperonta**
**kiel bitlibro: 8,00 eŭroj**

## Nigra magio (Deck Dorval kaj Christian Declerck)





Dum ŝtorma pluvoza vespero paneas aŭto. Unu el la kvar pasaĝeroj, la klarvida sinjorino Barnaŝ, eksentas la ĉeeston de malbonaj spiritoj... Jen la scenaro por enigmo solvenda de la juna detektivo Ksavero Kant.
Paĝoj: 216; 20,5 cm; kudre bindita; 1988.
Serio Stafeto, n-ro 7; ISBN 90 71205 23 1

**Prezo: 6,00 eŭroj**


# PROZO

## Opuntioj (Carmel Mallia)




Romano kiu baziĝas sur leteroj, entenantaj la dramon de la mediteranea insulo "Bonveno". Omar, pariza blindulo, kiu naskiĝis en Bonveno, aŭskultas sian francan nepon kiu legas al li la leterojn ricevitajn jarojn antaŭe, kaj kiujn li ne legis pro senzorgemo kaj laboro. La romano komenciĝas en Parizo kaj finiĝas en la Domo por maljunuloj en Bonveno.
Paĝoj: 235; 20,5 cm; glubindita; 2020.
ISBN: 978 90 77066 70 6

## Paradizo ŝtelita (Trevor Steele)




Aborigenoj vivis sur la insulo Tasmanio almenaŭ 20.000 jarojn. Laŭtakse vivis en 1800 ankoraŭ 2.000 ĝis 20.000 homoj tie, sed tri generaciojn poste la lasta plensanga aborigenino sur la insulo mortis. Oni ofte citas tion kiel klasikan kazon de genocido. Sed ĉu oni vere povas uzi la vorton genocido?
Paĝoj: 336; 20,5 cm; kudre bindita; 2012.
Serio Stafeto, n-ro 36; ISBN 978 90 77066 49 2

**Prezo: 19,20 eŭroj**
**kiel bitlibro: 10,10 eŭroj**


## La paŝo senelirejen (Jean Codjo)




Unua verko de Benina aŭtoro, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj...
Neteoria trakto, tamen tre inspira.
Paĝoj: 44; 20,5 cm; vinktita; 2007.
ISBN 90 77066 27 6

**Prezo: 6,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,00 eŭroj**

## Paulus fondinto (Trevor Steele)





La viro, kiun ni konas nun kiel "sankta Paŭlo", estis unu el la plej influaj homoj de la tuta homara historio. Pli ol unu historiisto diris, pli-malpli, ke eblas imagi kristanismon sen Jesuo - sed ne sen Paŭlo. Alivorte, la vera fondinto de kristanismo estis Paŭlo.
Paĝoj: 124; glubindita; 2020.
Serio Stafeto, n-ro 43; ISBN 978 90770 666 9

**Prezo: 10,20 eŭroj**
**kiel bitlibro: 6,00 eŭroj**

# PROZO

## Sagao de Njal - tradukis Baldur Ragnarsson




Sagao de Njal estas la plej granda kaj artisma el la t.n. Islandaj Sagaoj, verkitaj de nekonataj aŭtoroj en la 13-a jarcento. Konfliktoj, venĝoj, repaciĝoj viciĝas en drameca sinsekvo ĝis definitiva solviĝo. Tiu sagao estas tradukita jam en multaj lingvoj kaj estis elektita kiel unu el la cent plej bonaj verkoj de la monda literaturo.
Paĝoj: 358; ilustrita; 20,5 cm; kudre bindita; 2003.
ISBN 90 77066 07 1

**Prezo: 18,00 eŭroj**

## La sangoruĝa flago ( Trevor Steele)




Ekssoldatoj revenintaj el la Unua Mondmilito ofte malfacile readaptiĝis al civila vivo. Ankaŭ en Aŭstralio iamaj "militherooj", aparte la sen-laboraj, estis ekspluatataj de reakciaj politikaj fortoj. Rezultis koleraj rasismaj amasoj de perfortemuloj. Samtempe estis inter naivaj ideal-istoj multe da entuziasmo por la bolŝevisma regado en Ruslando.
Paĝoj: 206; libro glubindita; 2020. ISBN: 978 90 77066 67 6
Serio Stafeto, n-ro 44.

**Prezo: 16,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 8,50 eŭroj**


## Spitaj kiel hidrargo (Christian Declerck)




Ĉi tiu romaneto roligas homojn kiuj pri lingvoj interesiĝas, sed kiujn la vivo – postulema kaj akapara – kuntrenas, same kiel la 'neinteresitojn', en diversaj direktoj kun apartaj komplikoj, propraj cirkonstancoj kaj solvindaj situacioj.
Paĝoj: 208; 20,5 cm; kudre bindita; 2008.
ISBN 978 90 77066 00 3

**Prezo: 20,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 10,50 eŭroj**

## La ŝtona urbo (Anna Löwenstein)





Ampleksa historia romano. Juna keltino en la unua jarcento de nia epoko estas portita al Romo kiel sklavo. En Romo ŝi ekkonas la fruajn kristanojn, kiuj estas ne sanktuloj sed aktivuloj en nova movado ofte dividita pro kvereloj kaj polemikoj. La rigore kontrolita lingvoprovizo de la romano konsistas nur el fundamentaj kaj oficialaj radikoj.
Paĝoj: 365; 20,5 cm; kudre bindita; 1999 (1a eldono), 2017 (5a eldono).
Serio Stafeto, n-ro 23; ISBN 978 0 244 01389 9.

Kvina eldono

**Prezo: 24,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 12,60 eŭroj**

# PROZO

## La Talpoĉasisto (Stephan Lang) - tradukis Gerrit Berveling




Talpoĉasisto, tiel la ĉefrolulo estis nomita en Rumanio, ĉar laŭ ordono de la patrino li strangolis vivantan talpon. Ŝi estis konvinkita ke per tiu ago la filo ricevos la povon necesan por sukcesi dum la tuta vivo.
Paĝoj: 128; 20,5 cm; kudre bindita; 2008.
ISBN 978 90 77066 35 5

**Prezo: 19,49 eŭroj**

## Tarokoj kaj epokoj (Christian Declerck)




La libro havas "membiografian meĉon", ĉirkaŭitan de "materialo dokumenta", vakso kiu nutru la flamon kaj ĝi brulas lante kiel kandelo. Ĝi donas bildon pri nia mondo fine de la dua jarmilo. Laŭ Donald Broadribb, la tuta libro temas "pri la mensostato de la aŭtoro". Se tiel, ĝi estas serĉo de la vero – verko kun filozofia subfluo.
Paĝoj: 655; 20,5 cm; kudre bindita; 2002.
ISBN 90 71205 98 3.

**Prezo: 38,00 eŭroj**

## Urd Hadda murdita! (Deck Dorval)




Teatro-direktoro vespermanĝas en sia hejmo kun tri eminentaj aktoroj, amikoj liaj. Subite li estas mortigita. Unu el la tri amikoj devas esti la murdinto. Sed kiu solvos la problemon unue?
Paĝoj: 200; 20,5 cm; kudre bindita; 1990.
Serio Stafeto, n-ro 13; ISBN 90 71205 37 1.

Ekzistas ankaŭ
en la nederlanda!

**Prezo: 11,90 eŭroj**

## Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas (Manjo Austin)




Kiam la patrino de Maureen denove edziniĝas kaj la familio transloĝiĝas al nova hejmo, malfermiĝas por ŝi nekonata mondo plena de novaj parencoj. Ekiro en la profesian vivon eĉ pli malfaciligas la ŝanĝon. La rakonto kunportas nin en ŝia adoltiĝo meze de bela irlanda ĉirkaŭaĵo. Rekomendita por komencantoj.
Paĝoj: 128; 20,5 cm; kudre bindita; 1988.
Serio Stafeto, n-ro 6; ISBN 90 71205 21 5.

**Prezo: 5,00 eŭroj**

# NOVELOJ -RAKONTOJ


## La bela petveturantino (Leopold Vermeiren) - tradukis Lode Van de Velde




La juna poeto Marko rakontas ĉiuvespere al sia rava amatino Silvia unu erotikan rakonton. Rejna de Jong pri la libro skribis: “La etoso estas milda, afabla. Se eble la televidaj novaĵelsendoj naŭzis vin, prenu en la manojn la libreton de Vermeiren kaj via humoro certe pliboniĝos.”
Paĝoj: 76; 20,5 cm; glue bindita; 1996.
ISBN 90 71205 67 3.

**Prezo: 7,20 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,00 eŭroj**


## Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj (Sen Rodin)




Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj... enamiĝis en ĝi kaj en Nordlandanino. Li havas akrajn okulojn, rigardas per ambaŭ kaj fajne priskribas ĉion, tra sia persona vitro... Ĉiu ĉapitro estas aparta noveleto pri iu aŭ alia norda gemo.
Paĝoj: 360; 20,5 cm; glubindita; 2006.
Serio Stafeto, n-ro 30; ISBN 90 77066 22 5

**Prezo: 24,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 12,60 eŭroj**


## La egipta dancistino (Leopold Vermeiren) - tradukis Lode Van de Velde




En La egipta dancistino la mortinta faraono baldaŭ estos entombigata kun juna, bela dancistino... En Stranga virino, ombrelo perdita en tramo povas instigi al serĉado... pri la proprietulo kaj eble eĉ pri amo? Foje en La labirinto oni povas trovi, krom la elirejon, ankaŭ la amon.
Paĝoj: 96; 20,5 cm; kudre bindita; 1999.
ISBN 90 71205 97 7

**Prezo: 11,20 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,90 eŭroj**

## Kapturnoj (Higinio García)





La feliĉa mondo post 1984... Estras ĉion la granda Uzinurbo. Se vi havas lokon en ĝi via vivo estas senproblema kaj luksa, alimaniere vi difektiĝas, Uzinurbo simple vin forĵetas. Temas pri dek du memstaraj rakontoj kun kelkaj interrilatoj aŭ referencoj de unu al la alia.
Paĝoj: 160, 20,5 cm, kudre bindita; 1999.
Serio Stafeto, n-ro 24; ISBN 90 71205 82 7

**Prezo: 16,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 8,40 eŭroj**

# NOVELOJ -RAKONTOJ

## Kiel Vaglumo (Willem Elsschot) - tradukis Bert Boon




Tiu ĉi novelo de fama flandra verkisto estas plurtavola: la tavoloj sin kaŝas, ĝis la leganto atingas iun tavolŝlosilon, kiun li nur per tre atenta legado malkovros. La rakonto temas pri la fino de la jaro 1938... sed tion vi povas "kalkuli" nur ie meze de la novelo, kaj ... denove tiu scio donos al vi aliajn okulojn
Paĝoj: 56; 20,5 cm; kudre bindita; 2010.
ISBN 90 77066 45 4.

**Prezo: 10,00 eŭroj**

## La ludanta lumo (Leopold Vermeiren) - tradukis Cor Willems




"La rakontoj traktas amon, etoson, poezion kaj fantazion. Petole. Romantike. Elstaras la bonaj intrigoj." Derek Roff en Esperanto
Paĝoj: 94; 20,5 cm; glue bindita; 1995.
ISBN 90 71205 57 6.

**Prezo: 11,20 eŭroj**


## La nuda feino (Leopold Vermeiren) - tradukis Ivo Durwael




Silvia estas senindulga: nur post kiam Marko elpensis erotikan rakonton per la tri vortoj kiujn ŝi donas, li rajtas amori kun ŝi. Tiu sprono provizas al la juna poeto sufiĉan inspiron por kvar rakontaroj.
Paĝoj: 111; 20,5 cm; glue bindita; 1993.
ISBN 90 71205 49 5.

**Prezo: 11,20 eŭroj**

## Morgaŭ denove ni vidu (Simon Carmiggelt) - tradukis Gerrit Berveling





Simon Carmiggelt dum jardekoj estis unu el la plej popularaj aŭtoroj de Nederlando. La libro enhavas faskon da rakontoj kaj historietoj, kiujn karakterizas iom eferema kombino de zorgemo kaj malstreĉiĝo. Por Carmiggelt gravas ke ni "pluku la tagon" kaj morgaŭ ni vidu!
Paĝoj: 128; 13,5 cm; kudre bindita; 2002.
ISBN 90 77066 05 5

**Prezo: 10,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,25 eŭroj**

# NOVELOJ -RAKONTOJ


## Neokazinta amo (Lena Karpunina)




Ankaŭ amo neokazinta povas varmigi la koron. Lena, en deko da noveletoj, tre kortuŝe bildigas scenojn, foje humurajn, foje acidamarajn, foje fajne reve belajn.
Paĝoj: 152; 20,5 cm; kudre bindita; 2007.
Serio Stafeto, n-ro 31; ISBN 978 90 77066 28 7

**Prezo: 15,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 7,80 eŭroj**

## Nomoj (Johan Hammond Rosbach)




Nomoj estas aro da travivaĵoj, kiujn la aŭtoro spertis en Norvegio, Italio, Madejro,... kie li renkontis diversajn, ofte strangajn personojn.
Paĝoj: 74; 20,5 cm; vinktita; 1999.
ISBN 90 71205 83 5.

**Prezo: 8,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,00 eŭroj**

## Sub influo de alkoholo (J. Herbert Sullivan)




12 rakontoj de la aŭtoro de La vualo de l' tempo.
Paĝoj: 92; 20,5 cm; kudre bindita; 1991.
Serio Stafeto, n-ro 8; ISBN 90 71205 42 8.

**Prezo: 3,00 eŭroj**

## Tempo fuĝas (diversaj)




Rikolto de 25 rakontoj el la internacia magazino MONATO, elektitaj kaj redaktitaj de William Auld. Verkoj de i.a. Gianfranco Cazzaro, István Ertl, Sten Johansson, Julian Modest, Poul Thorsen. Ilustraĵoj de Hector Palacios, Jomo Ipfelkofer kaj Hugo Fontyn.
Paĝoj: 160; 20,5 cm; kudre bindita; 1995.
ISBN 90 71205 62 2.

**Prezo: 14,90 eŭroj**

# NOVELOJ -RAKONTOJ

## Tri rakontoj pri la Miljara Paco (John Francis)





Al kiu legis Vitralo, la fikci-historia mondo de tiu ĉi nova libro de Francis ne fremdos. La Miljara Paco cetere ne estas interpretenda laŭvorte.
Paĝoj: 120; 20,5 cm; kudre bindita; 1997.
Serio Stafeto, n-ro 20; ISBN 90 71205 66 5.

**Prezo: 11,90 eŭroj**

# TEATRO

## Konto de l' vivo (Paul Gubbins)




Kolekto de kvar teatraĵoj, du el kiuj akiris resp. la unuan kaj duan premion en la Belartaj Konkursoj. Ingrediencoj de la enhavo estas starpunktoj pri sociaj temoj kaj spritaĵoj.
Paĝoj: 140; 20,5 cm; kudre bindita; 1998.
Serio Stafeto, n-ro 22; ISBN 90 71205 76 2.

**Prezo: 13,50 eŭroj**

## Oktavia (Seneca) - tradukis Gerrit Berveling




Nerono – imperiestro de Romo, historie sufiĉe konata pro krueleco kaj frenezeco – ankaŭ en sia familia rondo kaŭzis tragediojn. Tion montras tiu ĉi teatraĵo en kiu repudiita edzino kontraŭas konkubinon.
Seneko, fama aŭtoro de filozofiaj ĉefverkoj, pruvis sian sperton ankaŭ en diversaj dramecaj teatraĵoj el kiuj Oktavia certe estas la plej interesa.
Paĝoj: 60; 20,5 cm; vinktita; 1994.
Serio Stafeto, n-ro 9; ISBN 90 71205 27 4.

**Prezo: 4,50 eŭroj**

**Ne nur la verkoj eldonitaj de FEL estas troveblaj en la Retbutiko, sed ĉiuj varoj distribuitaj.**

**Ĉu vi volas scii pli pri iu verko, legi recenzon pri ĝi aŭ konstati ĉu ĝi ankoraŭ estas en stoko?**

**Krozu do rapide al: www.retbutiko.be**

# POEZIO

## Dolĉe-amare (Emile Van Damme)




Poemaro pri la naturo, la vivmedio, la psika sano de la homoj per ĉiutagaj vortoj kiuj tuj trafas la kernon. Ilustris la poemaron la aŭtoro mem. Pri ĝi skribis William Auld: "Tiuj ĉi poemoj rekte trafis min sur la stomaknervoj - t.e. ili forte efikis al mi pro sia forta interplekto de vizio, simbolo kaj formo."
Paĝoj: 88; 20,5 cm; vinktita; 1990.
Serio Stafeto, n-ro 12; ISBN 90 71205 38 X. .

**Prezo: 5,00 eŭroj**

## El sisma zono (Mikaelo Giŝpling)




En sia unua poemaro, tiu ĉi rusa poeto prikantas plej diversajn temojn: naturo, famaj verkistoj aŭ literaturaĵoj, morto, homaj sentoj, milito, infanaĝo, amikeco, perdita amo, Esperanto. En sia enkonduka antaŭparolo William Auld ravite konfesas: "Mi timas registri mian admiregon".
Paĝoj: 110; 20,5 cm; kudre bindita; 1994.
Serio Stafeto, n-ro 19; ISBN 90 71205 56 8.

**Prezo: 7,40 eŭroj**


## La Konflikto de la Epokoj (Edwin de Kock)




Ĉi tiu epopeo rakontas pri kosma batalego, kun Lucifero kaj la homdia Kristo kiel ĉefrolantoj. Per spaca kaj tera vojaĝo multjarcenta kvin gvidantoj kondukas la aŭtoron por komprenigi pri la efikoj de la interluktantaj bono kaj malbono.
Paĝoj: 468; 22,8 cm; kudre bindita; 2019.
Serio Stafeto, n-ro 41; ISBN 978 9077066 58 4.

**Prezo: 33,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 17,34 eŭroj**

## Kanto pri Minotaŭro kaj aliaj poemoj (Gerrit Berveling)




Gerrit Berveling distingas sin ne nur kiel akademiano, redaktoro de Fonto kaj Monato, tre produktiva tradukisto el la helena kaj latina, sed ankaŭ per kontribuoj al la originala Esperanto-literaturo. Interkonatiĝu kun tiu ĉi poeto Berveling.
Paĝoj: 132; 20,5 cm; kudre bindita; 1993.
Serio Stafeto, n-ro 17; ISBN 90 71205 46 0.

**Prezo: 9,90 eŭroj**


## Meznokto metropola (Krys Ungar)




La unua poemaro de tiu ĉi elstara poetino.
Laŭ Carlo Minnaja estis nature, ke post trijara regado senrivala en la Belartaj Konkursoj kaj la Internaciaj Floraj Ludoj, Krys Ungar devis elpaŝi per libro. Li prave supozis kiam li demandis sin en Heroldo de Esperanto: "Ĉu aperis stelo de unua grandeco?"
Paĝoj: 112; 20,5 cm; kudre bindita; 1991.
Serio Stafeto, n-ro 14; ISBN 90 71205 41 X.

**Prezo: 9,50 eŭroj**


## Pasporto (Antoine Cassar - tradukis Klara Ertl)




"Pasporto" estas ŝercpasporto, kiu mokas la bezonon ĉiam havi kun si pasporton, kiam oni volas vojaĝi. Jam tradukita en 10 lingvojn.
Paĝoj: 32; vinktita; 2020.
ISBN 978 9077066720

**Prezo: 4,00 eŭroj**

## Plena poemaro (Eŭgeno Miĥalski)




La plenan poezian verkaron de tiu ĉi rusa aŭtoro forte influis la komunisma idearo. Editoris William Auld. Ampleksan enkondukon al la poemaro verkis Krys Ungar.
Paĝoj: 176; 20,5 cm; kudre bindita; 1995.
Serio Stafeto, n-ro 18; ISBN 90 71205 54 1.

**Prezo: 13,99 eŭroj**

## Se aŭskultas la animo (Guido Gezelle - tradukis Hector Vermuyten)





Guido Gezelle estas unu el la plej grandaj poetoj nederlandaj el ĉiuj tempoj. Li estas granda kaj vera poeto, ĉar en ĉiu verso ni aŭdas alte noblan viron. Li estas la poeto de la bela flandra naturo, religia lirikisto, kiu sentis ĝin kiel riveladon de la dieco. Al ĉio, eĉ la plej malgrandaĵo en la naturo, li donis ion el sia koro, kiu elŝutis poezion, lia spirito ne sin okupante pri skolo, reguloj nek konvencio.
Paĝoj: 52; ilustrita; 20,5 cm; vinktita; 1999.
ISBN 90 71205 80 0.

**Prezo: 7,10 eŭroj**

# POEZIO

## Simptomoj (Gonçalo Neves)




Post “Ibere libere” kie Gonçalo Neves sukcese elpaŝis kun siaj iberaj kolegoj, jen “originala poemaro senpreface” plume nur de li.
Paĝoj: 72; 20,5 cm; vinktita; 2000.
Serio Stafeto, n-ro 25; ISBN 90 71205 86 X.

**Prezo: 8,00 eŭroj**

## Sub la signo de socia muzo (William Auld, red.)




Antologio de poemoj kaj eseoj, redaktita de William Auld kaj Stefan Maul. Ilustraĵoj de Georgo Kamaĉo. Pli ol 50 poetoj festis la centjariĝon de Esperanto pere de tiu ĉi antologio:Julio Baghy, Kálmán Kalocsay, William Auld, Georges Lagrange, Poul Thorsen, Gerrit Berveling, Emile Van Damme kaj multaj aliaj.
Paĝoj: 126; 20,5 cm; kudre bindita; 1987.
Serio Stafeto, n-ro 2; ISBN 90 71205 16 9.

**Prezo: 5 eŭroj**


## Sub fremdaj ĉieloj (Edwin De Kock)




Edwin De Kock eldonis “lumdiskon” titolitan “Testamente”.
Tiu ĉi libro prezentas la plej grandan parton de la tekstoj el ĝi: eseojn, poemojn, membiografion. Vera monumento!
Paĝoj: 288; 20,5 cm; kudre bindita; 2008.
Serio Stafeto, n-ro 32; ISBN 978 90 77066 33 1.

**Prezo: 22,49 eŭroj**

## Suno kaj Ombroj (Rejna de Jong)





Poemaro pri feliĉo, pri rememoroj, pri la naturo, pri malpaco, pri poluado, pri komerco kaj konsumado, pri atomenergio kaj Eŭropo. Poezio tre simpla, jen ritma, jen senritma. Rejna de Jong estas persista poetino kun aparta voĉo.
Paĝoj: 76; 21,5 cm; vinktita; 2002.
ISBN 90 77066 02 0.

**Prezo: 10,00 eŭroj**

# POEZIO


## Supla amo (Herman De Coninck) - tradukis Lode Van de Velde




Dulingva nederlanda-Esperanta versio de la unua poemaro de Herman de Coninck.
Paĝoj: 76; 20,5 cm; kudre bindita; 2007.
ISBN 978 90 77066 32 4.

**Prezo: 16,00 eŭroj**

## Sur Parnaso (Timothy Brian Carr)




Tim Carr, konata el Esperanta Antologio kaj kiel plurfoja laŭreato de la Internaciaj Floraj Ludoj kaj la Belartaj Konkursoj, post longa polurado finfine aperigis sian unuan poemaron. Apud kelkaj rondeloj, ritmas majstraj sonetoj, enhave variantaj de socia engaĝiĝo tra am-esprimo al Esperantujo.
Paĝoj: 120; 20,5 cm; glue bindita; 1998.
Serio Stafeto, n-ro 21; ISBN 90 71205 73 8.

**Prezo: 12,00 eŭroj**


## Ŝirpecoj (anstataŭ monumento) (Christian Declerck)




Poezia erotika monumento de Christian Declerck starigita por siaj kvar amatinoj. “Declerck plurfoje surprizas per lertaj (foje tro lertaj) vortludoj kaj novaj fortaj esprimoj.” (Adriaan den Haan en Literatura Foiro) “Jen poemlibro tre bone ellaborita, en kiu karno kaj spirito sin prezentas kune, sed en konstanta barakta disduiĝado” (Kataluna Esperantisto).
Paĝoj: 168; 20,5 cm; kudre bindita; 1991.
Serio Stafeto, n-ro 15; ISBN 90 71205 44 4.

**Prezo: 5,00 eŭroj**

## Tempo tempesta (Franz-Georg Rössler)




La aŭtoro rigardas al kompleta jardeko de sia vivo (1985-1995). Li prezentas la poemojn, kiujn li verkis en tiu periodo kaj en aparta eseo *Dek jarojn Esperantisto* li priskribas sian movadan vivon. Kun ilustraĵoj de Rita Rössler.
Paĝoj: 24; 20,5 cm; vinktita; 1995.
ISBN 90 71205 63 0.

**Prezo: 3,00 eŭroj**

# POEZIO


## Tie ĉi tie (Mikaelo Giŝpling)




En tiu ĉi poezia libro la aŭtoro priskribas tre gravajn por li eventojn: transloĝiĝo el Moskvo en Jerusalem. Li konscie penas eviti artifikojn kaj poezian nebulon. Laŭ lia opinio, Esperanto devas esti klara kaj komprenebla al la legantoj el ĉiu mondparto. Ĉu li sukcesis en tio, aŭ ne, juĝu mem.
Paĝoj: 104; 20,5 cm; kudre bindita; 2003.
ISBN 90 77066 10 1.

**Prezo: 10,00 eŭroj**

## Vojaĝoj kaj aliaj poemoj (Edwin de Kock)





Meditu kun renoma poeto pri liaj travivaĵoj dum vojaĝo tra Skotlando, Anglio, Nederlando, Francio, Italio, Grekio, Kreto kaj partoprenu lian filozofadon pri la fluo de la tempo, milito kaj malfacilaĵoj en lia lando.
Paĝoj: 148; 20,5 cm; kudre bindita; 1992.
Serio Stafeto, n-ro 16; ISBN 90 71205 45 2.

**Prezo: 5,00 eŭroj**

# INFANOJ

## La Aventuroj de Pinokjo (Carlo Collodi) - tradukis Jozefo Horvath





La aŭtoro Carlo Lorenzini loĝis en Collodi (Italio) kaj por kompensi la sumon perdita dum hazardludo komencis skribi libron por la junuloj. La unua parto aperis en infangazeto kaj la libro mem en 1883. La Esperanto-traduko, far' Jozefo Horvath, enhavas la belajn originajn desegnaĵojn.
Paĝoj: 160; ilustrita: 20,5 cm; kudre bindita; 2007.
ISBN 90 71205 91 6.

Dua eldono

**Prezo: 10,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,26 eŭroj**

## La brulanta kastelo (Leopold Vermeiren) - tradukis Ivo Durwael





Heroa kavaliro renkontas multajn aventurojn, en kiuj li defendas la subpremitojn kaj luktas por honoro kaj justeco.
Paĝoj: 48; 20,5 cm; vinktita; 1997.
ISBN 90 71205 71 1.

**Prezo: 3,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 3,00 eŭroj**

# INFANOJ

## Cisko kaj Vinjo: La Brusela Bubo - tradukis Bert Boon kaj Marc Vanden Bempt




"La Brusela Bubo" estas traduko de la rakonto n-ro 180 el la populara nederlandlingva bildrakonto "Suske en Wiske" de Willy Vandersteen, jam tradukita en multdekon da lingvoj.
Paĝoj: 58; 29,7 cm; gluita; 2002.
Eldonis Standaard Uitgeverij Antverpeno-Belgio.

bindita, **mola kovrilo** **Prezo: 7,00 eŭroj**

bindita, **fortika kovrilo** (limigita eldono!) **Prezo: 49,00 eŭroj**

## Hundo de Flandrio (Ouida) - tradukis Lode Van de Velde




La aventuroj de la knabo Nelo kaj lia hundo Patraŝ, kiuj ĉiutage iris de sia hejmloko Hoboken al Antverpeno por vendi lakton. La libro estas filmita kvar fojojn. En Japanio aperis desegnita filmo kaj en Germanio oni kreis felietonan version.
Paĝoj: 52; 20,5 cm; vinktita; 2004.
ISBN 90 77066 08 X.

**Prezo: 5,95 eŭroj**


## Katorelo (Jeanette van Mens)




Ĉu vi foje demandas vin kio kaŝas sin post kata mieno, pli specife mieno de siama kato? En tiu ĉi amuza libreto ĉefrolas tia nobla hejmbesto.
"Vi legos ĝin kun plezuro; kaj eble lernos ion pri la emoj kaj bezonoj de katoj, se vi ne jam scias." (Marjorie Boulton)
Paĝoj: 82; 20,5 cm; vinktita; 1998.
ISBN 90 71205 74 6.

**Prezo: 5,95 eŭroj**

## Kolorigu la bestojn kaj lernu la alfabeton (Lode Van de Velde)





Infanlibreto kun bazaj frazetoj.
Paĝoj: 40; 20,5 cm vinktita; 2005.

**Prezo: 2,00 eŭroj**

# INFANOJ

## Humuro laŭ la skota maniero (Andrzej Pettyn)




150 ŝercoj pri Skotoj, kunigitaj de la tiama ĉefredaktoro de radio Varsovio. Kun antaŭparolo de la skota poeto William Auld.
Paĝoj: 84; 20,5 cm; vinktita; 1995.
ISBN 90 71205 60 6.

**Prezo: 5,00 eŭroj**
**NUR kiel bitlibro**

## Vortludoj (Lode Van de Velde)





Ĉu vi ŝatas akrostikojn, ambigramojn, drudelojn, kalemburojn, kriptogramojn, palindromojn, pleonasmojn...? Se jes, jen tiu ĉi nova libreto estas por vi!
Paĝoj: 36; 20,5 cm; vinktita; 2004.
ISBN 90 77066 09 8

**Prezo: 6,90 eŭroj**

# KUIRADO

## Internacie kuiri (Maria Becker-Meisberger)




Ĉu vi ŝatus hipogloson laŭ muelistina maniero kun leontodo-salato aŭ prefere unue ukrainan barĉon kun pampuŝkoj kaj kiel ĉefpladon "Amo kamuflita"? Tiujn ĉi kaj ducenton da aliaj internaciaj receptoj vi trovos en la kuirlibro por frandemuloj. Kun antaŭparolo de Marjorie Boulton.
Paĝoj: 320; 20,5 cm; kudre bindita; 2000.
ISBN 90 71205 70 3.

Dua eldono

**Prezo: 10,00 eŭroj**


# EKONOMIO - HISTORIO -SCIENCOJ

## Economie - Finance - Monnaie

Esperantigo de la naŭlingva verko “Glossaire Economie - Finance - Monnaie”, eldonita de la Komisiono de la Eŭropa Komunumo en 1985.
Paĝoj: 74; 20,5 cm; vinktita. Dua esperantlingva eldono 2000.

**Prezo: 9,50 eŭroj**
**kiel bitlibro: 5,00 eŭroj**

## Kalejdoskopa Rememoro (Alberto Fernandéz)




Ĉi tiu verko enhavas elekton de artikoloj, eseoj kaj poemoj (originalaj kaj tradukitaj), recenzon kaj prelegon pri scienco populara kaj progresema ideologio. La tekstoj ampleksas 40-jaran periodon kaj aperis en diversaj Esperanto-revuoj, en kelkaj libroj kaj en interreto.
Paĝoj: 216; 20,5 cm; kudre bindita; 2007.
ISBN 978 90 77066 34 8.

**Prezo: 15,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 7,88 eŭroj**


## Servisto de l’ ideo (Hans Jakob)




Se vi deziras ekscii detalojn pri mirinda servo kiun UEA liveris dum la unua mondmilito per zorgado de interŝanĝo de privataj leteroj inter la militantaj nacioj... legu tiun ĉi libron. Kaj multon pli vi ekscios pri homo... kiu konas ĉiujn kaj kiujn ĉiuj konis! Trezorejo pri la naskiĝo kaj kreskado de UEA el la buŝo de Hans Jakob.
Paĝoj: 195; 20,5 cm; kudre bindita; 1995.
ISBN 90 71205 58 4

**Prezo: 14,00 eŭroj**

## La vivo de Lidia Zamenhof (Wendy Heller)




Estis vera plezuro legi tiun ĉi libron. La aŭtoro estas malofta kombino de viveca verkanto kaj funde sciencista esploranto. La rezulto estas varma, fascina kaj vera rakonto pri idealistoj kaj ideoj antaŭintaj sian tempon (Stephen Zamenhof).
Paĝoj: 396; 20,5 cm; ilustrita; bindita; 2008.
ISBN 978 90 77066 36 2

**Prezo: 28,99 eŭroj**
**kiel bitlibro: 12,70 eŭroj**

# EKONOMIO - HISTORIO -SCIENCOJ

## La Origino de Specioj (Karolo Darvin) - tradukis Klivo Lendon




La teorio kiun Darvino prezentis en ĉi tiu verko radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.
Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, La Origino de Specioj, restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj kiuj interesiĝis pri la teorio de la evoluo.
Paĝoj: 430; 20,5 cm; ilustrita; kudre bindita; 2007.
ISBN 978 90 77066 40 9

**Prezo: 24,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 12,61 eŭroj**

## La kosmo kaj ni (David Galadí-Enríquez, Amri Wandel)




Tria eldono

Akorde kun sia subtitolo ("elementa kurso pri astronomio"), la verko konsistigas veran manlibron pri teoria kaj praktika astronomio. Skribita de du profesiaj astronomoj, ĉi tiu konciza verko prezentas tre aktualan bildon pri nuntempa astronomio en lingvaĵo kaj stilo facile komprenebla de ne-fakuloj. Verko blank-nigre ilustrita per desegnaĵoj kaj bildoj, kiuj akompanas kaj klarigas la tekston. La unua parto de la libro, pri ĝenerala astronomio, montras priskribon de la tuta kosmo (de nia planedo ĝis la plej malproksimaj galaksioj), kaj ankaŭ de la rimedoj, kiujn amatoroj povas uzi por aktiva observado de la firmamento. La dua parto, trafa komplemento de la unua, proponas vojaĝon tra la plej aktualaj temoj de moderna astrofiziko (stelevoluo, nigraj truoj, origino de la kosmo, ktp.) kaj pri vivo en la kosmo.
Paĝoj: 235; 20,5 cm; ilustrita; kudre bindita; 2017.
ISBN 90 71205 92 4

**Prezo: 18,00 eŭroj**

## Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj (Lidia Zamenhof)




La unuan mondmilito Lidia Zamenhof travivis adoleska kaj dum la dua ŝi pereis koncentreje. Ŝiaj kolektitaj artikoloj, paroladoj kaj fikciaj verkoj pentras unikan bildon de la periodo intermilita. Ili sumiĝas al granda, arda prediko por la esperantistojn savi de la regantaj naziismo, rasismo kaj aliaj materiismaj ideologioj. Kaj ŝi sopiris vidi ilin fermenti la venon de paca kaj justa estonteco pri kiu revis ŝia patro kaj kiun profetis ŝia religio.
Paĝoj: 430; 20,5 cm; ilustrita; bindita; 2009.
ISBN 978 90 77066 38 6

**Prezo: 24,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 12,61 eŭroj**

# ESPERANTOLOGIO


## Aglokula panoramo (Petro Desmet')




Vortluda enigma esprimo, rilate katpiedojn, estas la temo de la unua ĉapitro. Denove enŝoviĝis recepto de flandra frandaĵo sed la temoj restas tutmondaj. Se la muroj havas orelojn ili verŝajne amuze aŭskultos kaj pinte rektiĝos dum enĉambra ekskurso ĉe multfacetmontra recitado de Heine-poemo.

**Aperonta en 2021.**

## La Asocio (Ziko van Dijk)




La libro kunigas tri iom grandajn studojn: pri Biblioteko Hector Hodler, la statutoj de la Asocio kaj la Historioj de Esperanto. Ĝi enhavas mal-longajn kontribuojn pri: la centraj oficejoj, la Esperantaj Respond-kuponoj, germanlingvaj nomoj en la Jarlibro, britaj plendoj kontraŭ Privat ktp.

Paĝoj: 302; 20,5 cm; kudre bindita; 2008.

ISBN 978 90 77066 37 9

**Prezo: 24,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 12,61 eŭroj**

## Bildo kaj vorto, ĉiela forto (Petro Desmet')




La verko skizas la genezon de la Bildvortaro. Ĝi estas klara gvidilo al efika uzo de la bildvortaro kiel nocivortaron. Ĝi komparas la nunan eldonon kun la antaŭa versio de Eichholz, kun klara indiko de nerivaleco sed komplementeco en ambaŭ direktoj. Ĝi pritraktas kelkajn enigmajn bildojn kaj atentigas ke niaj bildvortaroj ne estas amuzaj bildstrioj por semajnfina familia tempopasado. Por posedantoj kaj uzantoj de niaj bildvortaroj la libro estas aldona necesa juveleto.

2020.

**Prezo: 6,10 eŭroj**
**NUR kiel bitlibro**

## Beletro, sed ne el katedro (Gaston Waringhien)



Ĉu vere ekzistas Esperanta literaturo? Ĉu eĉ ekzistas esperanta literatur-scienco? La nestoro de l' esperantaj literaturistoj instruas, en agrabla, klara, prilaborita stilo, pri la atingoj de niaj verkistoj kaj tradukistoj. Fakte temas pri simplaj klarigoj de altnivelaj artaj rezultoj.

Reviziita kaj ampleksigita versio de Eseoj I.

Paĝoj: 263; 20,5 cm; kudre bindita; 1987.

Serio Stafeto, n-ro 4; ISBN 90 71205 19 3.

**Prezo: 9,00 eŭroj**

# ESPERANTOLOGIO


## Esperanto kaj kulturo (Petro Desmet')




Neteoria sed pure praktika esearo surbaze de literaturaĵo de Marjorie Boulton, kiu nekontesteble pruvas, ke Esperanto havas kulturon, ke ĝi estas kulturo. Ankaŭ panoramo sistema pri la evoluo de la lingvo. La aŭtoro pritaksas sian kampon, kiel simpla kamparano akrokule priskribas la sian.


**Prezo: 6,00 eŭroj**
**NUR kiel bitlibro**

## Esprimaro, promeno en Edeno (Petro Desmet')




Ĉu vi volas scii, kiuj bestoj roras aŭ kvivitas aŭ krikrias? Plena listo troveblas en Esprimaro! Kiel oni bilde substrekas, per komparo, ke io aŭ iu estas bela? Esprimaro instruos vin! Esprimaro estas inversigita PIV! PIV klarigas la sencon de la vortoj. Ĝi iras de vorto al nocio. Esprimaro inverse, iras de nocio al vortoj ... liveras vortojn por esprimi nociojn.
Paĝoj: 140; 20,5 cm; glubindita; 2019.
ISBN 978 90 77066 60 7 **Prezo: 12,00 eŭroj**

## Esperanto sen mitoj (Marcus Ziko Sikosek)




Dua eldono

Mensogoj kaj memtrompoj en la esperanta informado. Dokumenta libro kun esenca materialo por bona informado pri Esperanto. Pragmate verkita, sen preteratenti la historian dimension, kun abundaj referencoj al fontomaterialo (kiu facile retroveblas en ampleksa bibliografio) kaj indekso de nomoj kaj terminoj.
"Jen dokumento, kiun ni jam delonge bezonis en Esperantujo. Laŭ mi, ĝi meritas multe pli vastan diskonigon." (Ivo Durwael, eksa UEA-estrarano pri informado)
Paĝoj: 314; 20,5 cm; kudre bindita; 2003.
ISBN 90 71205 70 3

**NUR kiel bitlibro: 15,77 eŭroj**

Retbutiko.be donas al vi multe pli da serĉebloj ol antaŭe. Vi povas tuj serĉi el la adres-trabo de via foliumilo (Firefox, Chrome, Explorer, Safari ktp). Ekzemple tajpinte **retbutiko.be/trovu/Steele** vi tuj trovos ĉiujn verkojn de Trevor Steele, tajpinte retbutiko.be/trovu/politiko vi trovos ĉiajn verkojn pri politiko, aŭ post tajpado de retbutiko.be/trovu/internacia vi trovos ĉiujn verkojn kun la vorto "internacia" en la titolo. Elprovu tuj kiel facila tio estas!

# ESPERANTOLOGIO

## Fositaj sulketoj (Petro Desmet')




Théophile Cart (1855-1931) lanĉis, ĉirkaŭ 1907, la plej konatan instigan esprimon "Ni fosu nian sulkon!". Intertempe, feliĉe, multe da sulketoj jam estas fositaj kaj tiu ĉi libro pritraktas kelkajn sed ankaŭ ne hezitas priparoli foje neperfektecojn. La sulkoj etendiĝas de Ĉinujo al Eŭropo kaj Tutmondo. Frandu kaj fine… la fromaĝo estos surtable!
**Aperonta en 2021.**

## Flandra kaj nederlanda Esperanto-bibliografio (Guido Thys)




Bibliografio de libroj pri Esperanto kaj Esperanto-lernolibroj eldonitaj en Flandrio kaj Nederlando inter 1900 kaj 1980. Kun alfabeta nomindekso.
Paĝoj: 92; 20,5 cm; vinktita; 1983.

**Prezo: 3,00 eŭroj**

## Fundamento de Esperanto - eldono nederlanda




Se nur unu libron esperantan vi posedu, tiam nepre tiun ĉi!
Traduko en la nederlanda de la "Fundamento de Esperanto".
En la 1a UK en Bulonjo ĉe maro ĝi estis proklamita netuŝebla bazo de Esperanto.
Paĝoj: 136; 13,5 cm; glue bindita; 2005.
ISBN 90 77066 19 5

**Prezo: 10,00 eŭroj**

## Fundamento por popolo (Petro Desmet')





En popoleca, tamen serioza, maniero la aŭtoro en dudeko da ĉapitroj trafoliumas la kompletan fundamenton seslingvan. Inspirita de D-ro Albault li klopodas malkovri la ruzaĵojn de Zamenhof. Li, kiel Albault, konstatis ke Zamenhof treege ofte, treege ruze parolas, aŭ skribas inter la linioj.
Eldonjaro: 2020.

**Prezo: 6,60 eŭroj**
**NUR kiel bitlibro**

# ESPERANTOLOGIO

## Mikspoto (Petro Desmet')




Eĉ la poetika pezo de nia lingvo kaj la maniero ŝerce pruvi sian ekvilibron pritraktiĝas en tiu ĉi libro. Simpla buterpantranĉaĵo gvidas nin tra diversaj kulturoj kaj montras al ni ke la lingvo ne jam estas matematiko… sen decido pri bedaŭro aŭ ĝojo. En multaj lokoj la leganto ricevas plian materialon por plua pensado. Kaj mikspoto ja estas plado…
**Aperonta en 2021.**


## Unua libro - franca eldono




*Langue internationale (préface et manuel complet)*. Faksimila represo de la "Unua Libro por francoj de D-ro Esperanto" (1887). Ĝi estas la komenco, la ĝermo, de niaj lingvo kaj movado. En 1887 preskaŭ samtempe aperis la rusa, la germana, la franca kaj la pola versioj.
Nepra dokumento por ĉiu kiu eĉ nur iomete konas la francan.
Paĝoj: 48; 20,5 cm; vinktita; 2006.

**Prezo: 5,00 eŭroj**

## Nia Fundamento sub lupeo (G. F. Makkink)




Klera studo pri la Fundamento, kiu al Juan Régulo Pérez skribis:
"Mi simple estas ravita!"
Paĝoj: 128; 20,5 cm; kudre bindita; 1990.
ISBN 90 71205 39 8.

**Prezo: 10,00 eŭroj**


## Tentakloj kaj Ligiloj (Petro Desmet')




Fakte tiu ĉi libro estas la fino de deklibra serio pri proverboj, esprimoj, komparoj kaj multe pli. Ĝi nodas kelkajn pendantajn laĉojn. Sed precipe la libro liveras la alfabetan registron de la frazeoloj (se frazeologio ekzistas, ĉu ne ankaŭ frazeolo?) prezentitaj en la tuta serio.
Nura registro ĝi nepre ne estas, ĉar duono estas proverbesploro.
2020.

**Prezo: 5,00 eŭroj**
**NUR kiel bitlibro**

## Nederlanda Bibliografio (Petro De Smedt)




Kiu teksto de kiu nederlandlingva aŭtoro tradukiĝis esperanten? Kiu tradukinto tradukis kiujn tekstojn? Kiuj revuoj publikigis tradukojn el la nederlanda?
Respondojn vi trovos en tiu ĉi libro. Plie alfabeta listo laŭ ĉiuj senchavaj vortoj de titoloj.
Paĝoj: 240; 20,5 cm; bindita; 1972

**Prezo: 5,00 eŭroj**

## Oklingva proverbaro (Zamenhof)




Finfine realiĝas la sonĝo de Marko kaj Ludoviko Zamenhof: kunigo en unu libron de la frazeologio kaj ĝia esperantigo. Por bone kompreni la Zamenhofan Proverbaron, nepre necesas disponi pri la frazeologio de la patro... kiu bedaŭrinde konserviĝis nur ĝis paragrafo 781. Internacia samideanaro klopodis tamen restaŭri la verkon, kaj eĉ aldonis tri lingvojn, tiel ke nun familiece apudiĝas ekvivalentoj rusaj, polaj, francaj, germanaj, esperantaj, hungaraj, nederlandaj kaj latinaj.


**Prezo: 39,00 eŭroj**

## Praktika Fundamento de Esperanto (Zamenhof)




Tutesperanta "Fundamento de Esperanto", kompleta, ĝis nun ne ekzistas. Tiu ĉi "traduko" estas Fundamento por la milionoj da homoj kiuj NE konas unu el la kvin etnaj lingvoj de nia Fundamento. Ĝi liveras esperantan tekston de la gramatiko kaj difinojn de la UV laŭ Kabe. Ĝuste pro tiuj la verko estas ankaŭ utila al fagopiranoj (francoj, angloj, germanoj, poloj kaj rusoj).

## Proverboj sub lupeo (Petro Desmet')




La aŭtoro mem priskribas sian verkon jene: "Dum multaj jaroj mi, en Ipernity, havis blogon en kiu mi raportis pri miaj klopodoj prepari eldonon de la Oklingva Proverbaro, sed precipe pri mia intenco "kompreni kaj komprenigi" ĉiujn proverbojn. Tiu ĉi libreto do estiĝis el kunigo de granda parto de tiuj klarigaj artikoloj."
2020.

**Prezo: 5,00 eŭroj**
**NUR kiel bitlibro**

# ESPERANTOLOGIO

## Vortarludoj (Petro Desmet')




Dudeko da eseoj pri la korp' ĉe korpa batalado de vortaristo kun la vortoj. Detektiva spurado por kapti la vere unike ĝustan vorton, aŭ por vere ĝuste kompreni mallongan, foje enigman, esprimon. Malkaŝo de disharmonioj en ŝajne kiom eble plej harmonia kunaro: kiel fagopiro estas plej ofte kvin-diversfrukta (treege simila vorto france, angle, germane, (o) pole, (i) ruse ne nepre estas unusignifa!).

2020.

**Prezo: 5,30 eŭroj**
**NUR kiel bitlibro**

## Vortoj, Vortaroj kaj Vortaristo (Petro Desmet')





Se la antaŭaj bitlibroj de Petro precipe pritraktis esprimojn kaj proverbojn, en ĉi tiu libro temas pli pri vortaroj en ilia tuto kaj pri problemoj kun unuopaj vortoj. Ankaŭ priskribiĝas la ofte tre peniga serĉado de la ĝusta etnolingva vorto, kaj la detektiveca maniero, kvazaŭ per robotfoto, por trovi (rekonstrui?) ĝin, eĉ se ĝi ne apartenas al via aktiva scio. Tuŝita estas la konstato ke ofte "tute facile klaraj", ĉar preskaŭ samvortaj, kvinlingvaj UV-serioj en vero montras nur falsamikaron! Ne kaŝita estas la fakto ke la dentoj de la tempo ankaŭ ronĝas kaj infektas nian vorttrezoron. La tekstoj instigu vin al detektivado en via propra denaska lingvo!

**Prezo: 6,60 eŭroj**
**NUR kiel bitlibro**

# BIBLIOGRAFIO

## Memorlibro pri Jules Verstraeten




Ĉi tiu libreto estas eldonita por vivteni la memoron pri Jules Verstraeten. Kiam li konatiĝis kun Esperanto, en 1950, li vidis en ĝi la realigon de infana revo pri pli justa komunikado surbaze de egaleco. Ekde tiam li konsekvence dediĉis siajn liberan tempon, energion kaj monon al la dis-vastigo de Esperanto kaj al la subteno de ĉiaj iniciatoj en la movado ĝis sia morto. Tial kaj tiel li konstante instigis kaj inspiris aliajn aktivulojn en la Esperanto-movado.
56 paĝoj. Vinktita broŝuro. 2007.

**Prezo: 5 eŭroj**

# MOVADO

## Eksterrete 1: pri lerniloj kaj vortaroj (Yves Nevelsteen)




Ĉio estas trovebla en interreto! Sed... multaj retejoj prezentas malaktualajn informojn kaj ne plu uzeblajn versiojn de programoj. Trovi la indaĵojn estas temporabe kaj foje iom komplike. Ĉi tiu broŝuro donas superrigardon de lerniloj kaj vortaroj, klarigoj pri ĉapelitaj literoj kaj vortareto trilingva de oftaj prikomputilaj vortoj.
Paĝoj: 36; A5; vinkita broŝuro; 2020.

**Prezo: 3,00 eŭroj**

## Eksterrete 2: pri bitlibroj kaj bitgazetoj (Yves Nevelsteen)




Ĉio estas trovebla en interreto! Sed... multaj retejoj prezentas malaktualajn informojn kaj ne plu uzeblajn versiojn de programoj. Trovi la indaĵojn estas temporabe kaj foje iom komplike. Ĉi tiu dua volumo de Eksterrete donas superrigardon de kaj klarigojn pri indaj kaj ĝisdataj projektoj rilate bitlibroj kaj bitgazetoj.
Paĝoj: 60; A5; vinkita broŝuro; 2020.

**Prezo: 3,00 eŭroj**


## El verva vivo ĵurnalista (Stefan Maul)




Stefan Maul estas ĵurnalisto, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO. Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj foje kortuŝa libro.
Paĝoj: 272; 20,5 cm ; kudre bindita; 2005.
ISBN 90 77066 18 7

**Prezo: 19,99 eŭroj**
**kiel bitlibro: 10,20 eŭroj**

## Informado praktike (Ziko Van Dijk)





Manlibro por ĉiuj kiuj volas informadi pri Esperanto. Verki informilon, deĵori ĉe standoj, krei retpaĝon, kolekti monon... la emfazo estas je la praktika flanko.
Paĝoj: 112; 20,5 cm; kudre bindita; 2007.
ISBN 978 90 77066 29 4

**Prezo: 15,00 eŭroj**
**kiel bitlibro: 7,88 eŭroj**

# FILOZOFIO - RELIGIO


## La afero Jesuo kaj la Judoj (Peter J. Thomson)




Kiu fakte estis Jesuo? Kio estas lia signifo? Jam dum lia vivo pri tio furiozis arda konfikto kun la Judoj. Sed kiel la afero Jesuo rilatas al la Judoj? La libro serĉas la respondojn: unu pozitivan kaj unu negativan.
Paĝoj: 160; 20,5 cm; kudre bindita; 2000.
ISBN 90 71205 94 05.

**Prezo: 11,00 eŭroj**

## Imitado de Kristo (Thomas A Kempis) - tradukis G. F. de Ruyver




Jen la plej mondfama libro post la Biblio. Jen unu el la pli ol naŭdek tradukoj, unu el la pli ol kvar mil eldonoj. Ne nur kristanoj, sed ankaŭ islamanoj kaj budhanoj el ĝi ĉerpas saĝecon, apogon, esperon kaj konsolon. Tre longa estas la listo de famaj personoj, kiuj atestis pri sia alta estimo je ĉi tiu modesta libro. Inter ili Dag Hammarskjöld kaj Teresa de Lisieux.
Paĝoj: 166; 20,5 cm; bindita; 1997.
ISBN 90 71205 65 7.

**Prezo: 11,90 eŭroj**

## Esperanto. La nova latino de la eklezio (Ulrich Matthias)




Jam de pli ol 100 jaroj Esperanto servas al la kompreniĝo inter kristanoj el la tuta mondo. Tiu ĉi libro rakontas pri la historio kaj nuntempo de la katolika kaj protestanta movado. Kaj ĝi vortigas la argumentojn por lingvo, pri kies avantaĝoj kristanaj esperantistoj ĉiam denove konsciiĝas.
Paĝoj: 144; 20,5 cm; ilustrita; kudre bindita; 2001; ISBN 90 71205 97 5.

**Prezo: 7,95 eŭroj**

La libro aperis ankaŭ en la angla lingvo de la sama aŭtoro:

### Esperanto. The new Latin for the church

Paĝoj: 144; 20,5 cm; ilustrita; kudre bindita; 2002; ISBN 90 71066 04 7.

**Prezo: 7,95 eŭroj**

kaj en la franca lingvo:

### L'Espéranto. Un nouveau latin pour l'église et pour l'humanité

Paĝoj: 288; 20,5 cm; ilustrita; kudre bindita; 2005; ISBN 90 71205 97 5.

**Prezo: 12,00 eŭroj**

## En la nederlanda

### Esperanto vandaag

Deko da eseoj pri la hodiaŭa situacio de Esperanto.

Paĝoj: 40; 20,5 cm; vinktita; 1996 ; ISBN 90 71205 11 8.

**Prezo: 1,51 eŭroj**

### De propedeutische waarde van de internationale taal Esperanto (Helmar Frank)

Kiberbetika teorio kaj empiriaj rezultoj de lingvo-orienta instruado de la Internacia Lingvo kiel bazo por posta lernado de etnaj lingvoj.

Paĝoj: 46; 20,5 cm; vinktita; 1987; 3a eldono; ISBN 90 71205 12 6.

**Prezo: 1,50 eŭroj**

### Esperanto: je vraagt maar

Verscheidene dikwijks gestelde vragen over het Esperanto.

Paĝoj: 20; 20,5 cm; vinktita; 1999 ; ISBN 90 71205 01 0.

**Prezo: 1,50 eŭroj**

### Esperantosleutel

Modernigita "ŝlosilo" kun skiza gramatiko kaj listo de 1500 bazaj vortoj.

Paĝoj: 47; alto: 150 mm; vinktita; 2006; ISBN 97 8908032 26 46.

**Prezo: 1,00 eŭro**

### Esperanto: Europese of Aziatische taal?

Waar situeert zich Esperanto? Tussen de agglutinerende of isolerende talen?

Paĝoj: 34; alto: 210 mm; vinktita; 1986; ISBN 90 71205 15 0.

**Prezo: 1,50 eŭroj**

# INFORMILOJ PRI ESPERANTO

## En la angla

### The Socio-Political, Educational and Cultural Values of Esperanto (Edward Symoens)

Pri la soci-politika, kultura kaj pedagogia valoroj de Esperanto.

Paĝoj: 44; 20,5 cm; vinktita; 1989. Eldonis ILEI. FEL estas la ĉefa distribuanto.

**Prezo: 1,50 eŭroj**

## En la franca

### Apprendre des langues étrangères (Edward Symoens)

Kiel la kono de Esperanto plifaciligas lingvolernadon ?

Paĝoj: 64; 20,5 cm; vinktita; 1994; ISBN 90 71205 53 3.

**Prezo: 1,50 eŭroj**

### Valeurs socio-politique pédagogique et culturelle de l'espéranto (Edward Symoens)

Pri la soci-politika, kultura kaj pedagogia valoroj de Esperanto. Paĝoj: 44; 20,5 cm; vinktita; 1989. Eldonis ILEI. FEL estas la ĉefa distribuanto.

**Prezo: 3,74 eŭroj**

# LINGVOLERNILOJ

## Pri Esperanto

### ABC-gramatiko de Esperanto (Ch. De Vleminck kaj E. Van Damme)




Moderna ampleksa Esperanto-gramatiko en kiu lernantoj (kaj lernintoj!) povas facile trovi respondon pri ajna gramatika problemo. La temoj estas ordigitaj alfabete, do multe pli super-rigardebla ol PAG.

"[...] la dukolumna prezento (dekstre, klarigoj; maldekstre, pluraj trafaj ekzemploj), la evitado de tro teknikaj gramatikaj terminoj... ĉio faras el tiu ĉi libro valoregan helpilon [...]." (Kataluna Esperantisto, 1995/1)

Paĝoj: 240; formato A4; kudre bindita; 1994.

ISBN 90 71205 52 5.

**Prezo: 29,75 eŭroj**

# LINGVOLERNILOJ

## Ekzercaro, dua nivelo (Julián Hernández Angulo)




Praktiko favorigas lernadon, jen la kialo de tiu ĉi ekzercaro.
Paĝoj: 64; 20,5 cm; vinktita; 1998.

**Prezo: 3,95 eŭroj**

## Gramatika ABC-mempraktikilo (Ch. De Vleminck kaj E. Van Damme)




La Gramatika ABC-mempraktikilo estas alloga, moderna ilo por lerni kaj instrui. Ĉe multaj ekzercoj troviĝas referenco al la teoria klarigo en ABC-gramatiko de Esperanto, sed ankaŭ aparte la libro perfekte uzeblas. Unuopaj gramatikaj problemoj estas traktitaj je pluraj niveloj per travideblaj, bone aranĝitaj ekzercoj. La enhavo estas strukturita alfabete laŭ temoj. Ilustraĵoj vigligas la tuton.
Paĝoj: 320; 29,7 cm; kudre bindita; 1993.
ISBN 90 71205 47 9.

**Prezo: 17,00 eŭroj**

## Leksikaj ekskursoj (Ch. De Vleminck kaj E. Van Damme)



Ilustroplena kaj agrable didaktika lernolibro pri la esperanta leksiko. Por lude plivastigi vian vortprovizon.

### Unua volumo

**Elĉerpita**

### Dua volumo

Paĝoj: 208; 20,5 cm; kudre bindita; ilustrita; 2007
ISBN 90 71205 77 0


**Prezo: 14,00 eŭroj**

### Tria volumo

Paĝoj: 192; 20,5 cm; kudre bindita; ilustrita; 2005
ISBN 90 77066 06 3

**Prezo: 15,00 eŭroj**


## Nemave edifi (Stefan MacGill)




Legu la sensaciajn malkaŝojn pri nia propra movada militeto kontraŭ la ombraj kaj minacaj fortoj de fanatikismo. En en formo de teatraĵoj, kune kun ekzercoj kaj rolludoj. Idealaj por progresiga kurso, hejma perfektigo aŭ simple amuzo.
Paĝoj: 264; 20,5 cm kudre bindita; 2007.
ISBN 90 77066 25 X.

**Prezo: 19,99 eŭroj**

## Subtekste (Paul Gubbins)



Amuza konversacia kurso, surbaze de krestomatio konsistanta nur el tekstoj de la revuo Monato. La demandoj kaj taskoj devigas vin al aktiva lingvo-uzo. Tre variaj tekstoj kaj temoj dividitaj laŭ diveraj gradoj. La elpreneblaj paĝoj en plasta kovrilo ebligas aldoni novajn paĝojn en la estonteco.
Paĝoj: 96; 20,5 cm; plasta ujo kun elpreneblaj paĝoj; 1999.
ISBN 90 71205 78 9

**Prezo: 15,00 eŭroj**

# En la nederlanda


## Esperanto programita (Hermann Behrmann kaj Paul Peeraerts)




La fama kurso por memlernado, konsistanta el dika manlibro.
Lernolibro 350-paĝa; 20,5 cm; 1986.
ISBN 90 71205 14 2.

**Prezo: 5,50 eŭroj**

## Taalcursus Esperanto (Lode Van de Velde, Eldonejo Libera)




Per ĉi tiu lingvokurso vi rapide akiros bonan komprenon de Esperanto. La elementoj, kiujn vi jam konas de la nederlanda, estas uzataj kiel eble plej multe kaj la aŭtoro foje uzas vian (pasivan) konon pri interalie la franca kaj la angla.
Lernolibro 92-paĝa; 24,5 cm; 2019.
ISBN 978 0 244 17466 8.
FEL ne eldonis ĉi tiun verkon, sed estas ĝia ĉefa distribuanto.

**Prezo: 12,00 eŭroj**

# LINGVOLERNILOJ

## Pri Esperanto en la franca

### Grammaire ABC d’ espéranto (Ch. De Vleminck kaj E. Van Damme)




Moderna franclingva Esperanto-gramatiko en kiu lernantoj (kaj lernintoj!) povas facile trovi respondon pri ajna gramatika problemo dank’ al la alfabeta ordigo laŭtema. Kun enkonduko de Gaston Waringhien.
Paĝoj: 320; 20,5 cm; kudre bindita; 1989/2006.
ISBN 90 71205 30 4.

**Prezo: 23,00 eŭroj**

Tria eldono

# MEDIO - POLITIKO - SOCIO

### Al la tero returne (Gilbert R. Ledon)




“La homo forgesis, ke la naturo ne apartenas al ĝi, sed ke ĝi apartenas al la naturo... Sekvas praktikaj ekzemploj de ĉi tiu nepra kaj urĝa savo, kie la homo memvole povos starigi sistemon de libera kaj individua kooperado... al la tero returne.”
Paĝoj: 160; 20,5 cm; kudre bindita; ilustrita; 1992.
Eldonis la aŭtoro. FEL estas la ĉefdistribuanto.

**Prezo: 5,00 eŭroj**

### Kie diskriminacio justas (Werner Schad)





Travojaĝinte Sud-Amerikon Werner Schad publikigis plurajn artikolojn pri la tiea politiko kaj kelkajn librojn pri vojaĝado en tiu kontinento. Ĉi-librete li tuŝas la koruptecon en Sud-Ameriko.
Paĝoj: 36; 20,5 cm; vinktita, 1990.
Eldonis la aŭtoro, distribuas FEL.

**Prezo: 3,00 eŭroj**

# MEDIO - POLITIKO - SOCIO

## Sennaciece tra nia mondo (Gilbert R. Ledon)




La aŭtoro vizitis pli malpli la tutan terglobon. Li ne nur rakontas pri siaj travivaĵoj tra la jaroj, sed ankaŭ komentas ilin laŭ tre persona, pripensinda maniero.
Paĝoj: 224; 20,5 cm; kudre bindita; kolore ilustrita; 1989.
Eldonis la aŭtoro. FEL estas la ĉefa distribuanto.

**Prezo: 9,00 eŭroj**

## Deklingva manlibro pri politiko (Stefan Maul, red.)




Enciklopedio pri ĉiaj nuntempaj terminoj pri la politika vivo kun traduko en dek lingvoj: Angla, Franca, Germana, Hispana, Nederlanda, Portugala, Rusa, Ĉina, Japana kaj Esperanto. En Heroldo de Esperanto (aprilo 1995) ĝi estis nomita "modela konsultlibro".
Paĝoj: 240; 20,5 cm; glubindita; 1994.
ISBN 90 71205 50 9.

**Prezo: 9,50 eŭroj**

# VORTAROJ

## Woordenboek - Nederlands-Esperanto-Nederlands




La nova kompleta vortaro Nederlanda-Esperanto-Nederlanda. Ĉef-redaktoro: Petro De Smedt. La vortaro enhavas pli ol 44 000 vortojn, 12 000 parolturnojn, 900 proverbojn en la parto nederlanda-esperanta kaj 17 000 vortojn, 2 500 parolturnojn kaj 450 proverbojn en la parto esperanta-nederlanda
Paĝoj: 576; formato 20,5 cm; 2004; ISBN 90 77 066 12 8.

bindita, **mola kovrilo** — **Prezo: 18,00 eŭroj**

bindita, **fortika kovrilo** (limigita eldono!) — **Prezo: 32,00 eŭroj**

# VORTAROJ


## Vasta vortaro Esperanto-nederlanda “PIV-ido”
## Uitgebreid woordenboek Esperanto-Nederlands (Petro Desmet’)




La Vasta vortaro Esperanto-nederlanda havas kiel subtitolon “PIV-ido”, ĉar ĝi enhavas ĉiujn kapvortojn el PIV, kun la ĝusta nederlanda traduko. Eĉ pli, ĝi enhavas amason da utilaj kaj bezonataj kunmetaĵoj. Dum 18 jaroj preskaŭ ne pasis unu tago sen ke aldoniĝis kelkaj vortoj, ofte el la ĉiutaga vivo, al la vortaro.
Paĝoj: 1040; 20,5; kudre bindita; 2020.
ISBN 978 90 77066 65 2

**Prezo: 59,00 eŭroj**

## Poŝvortareto Nederlands-Esperanto-Nederlands




Jen la nova Poŝvortareto, Zakwoordenboekje Nederlands-Esperanto-Nederlands, ekzakte laŭmezure de via poŝo. La poŝvortareto enhavas nur vortojn kunmetitajn per la oficialaj radikoj de Esperanto, kaj do strikte kongruas kun la Fundamento de Esperanto.
Paĝoj: 124; formato 14,8 cm; vinktita kun plasta kovrilo.
2005; ISBN 90 77 066 16 0.

**Prezo: 1,49 eŭroj**

En 2009 aperis ampleksigita versio de ĉi tiu verko.

**Prezo: 3,00 eŭroj**

# DIVERSAĴOJ

## La Jaro 2021

Poŝformata agendo kun la festotagoj de multaj landoj kaj religioj de la tuta mondo!
Paĝoj: 1 jaro da; formato A6; en plasta kovrilo; vinktita.

**Prezo: 6,90 eŭroj**

## Monato-kolektilo

Fortika plasta kovrilo por tuta jarkolekto de la revuo *Monato*.

**Prezo: 1,50 eŭroj**

# VERKOJ DE ALIAJ ELDONEJOJ

Flandra Esperanto-Ligo distribuas ne nur siajn proprajn eldonojn! Ni peras ankaŭ librojn de aliaj eldonejoj. Jen kelkaj furoraj verkoj kiuj estas haveblaj ĉe FEL, en ĝia retbutiko kaj surloke en la libroservo en Antverpeno. Kontaktu nin, se vi volas, ke FEL distribuu ankaŭ viajn librojn.

Atenton: por verkoj de aliaj eldonejoj la rabato estas limigita al 16% ekde 3 eroj. Detaloj aperas en nia retbutiko **www.retbutiko.be**

## La eta princo (Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto France)




Fascina fabela rakonto ne nur por infanoj. Kun desegnaĵoj de la aŭtoro. La antaŭa eldono (2010) estis la rezulto de 14 monatoj da intensa laboro, François Lorrain kun internacia teamo da tradukantoj serioze denove prilaboris la originalan tradukon, por forigi diversajn erarojn kaj denove verki multajn frazojn, celante tekston la plej fidelan al la verko de Antoine de Saint-Exupéry.

**Prezo: 12,50 eŭroj**

## Libroj de Julian Modest (Eldonejo Libera)




Julian Modest – pseŭdonimo de Georgi Miĥalkov , bulgare: Георги Михалков) – estas bibliotekisto, tradukisto kaj Esperanta verkisto el Bulgario. Li verkis teatraĵon, romanojn, sed ĉefe novelojn, kiuj eligas tute propran, riĉan, profunde homan kaj kortuŝan emoci-senton. Julian Modest estas regula kunlaboranto de la magazino Monato.

Pluraj libroj de ĉi tiu aŭtoro aperis ĉe Eldonejo Libera kaj estas aĉeteblaj ĉe FEL. Vidu **www.retbutiko.be/trovu/modest**

## Mil unuaj vortoj en Esperanto (Esperanto-Asocio de Britio)




Kolora bildvortaro kun babiligaj kaj ridigaj situacioj, por diversaĝaj infanoj (reviziita eldono). Mil Unuaj Vortoj estas trezoro da lernigaj ebloj por infanoj de ĉiu aĝo. Ankaŭ por plenkreskuloj! Ĝi estas fascina paroliga libro por helpi eklegi en Esperanto, kaj fonto de ideoj por konversacio.

**Prezo: 6,60 eŭroj**

# VERKOJ DE ALIAJ ELDONEJOJ

## Manlibro pri instruado de Esperanto (ILEI)




Por bone kaj efike instrui nian lingvon, nia movado bezonas trejnitajn instruistojn, tiajn, kiuj havas pedagogiajn kaj metodologiajn konojn kaj spertojn, informojn pri modernaj metodoj, kiuj konas la plej modernajn lernilojn kaj helpilojn kaj kapablas organizi sian laboron, ĉu ene de la movado, ĉu responde al la postuloj de instituciaj kadroj.

Pro la fakto, ke ne facilas organizi ĉie ĉeestajn trejnadojn, multaj el niaj instruantoj bezonas almenaŭ faklibron kaj subtenon. La nova Manlibro plenumas kaj tiujn taskojn kaj disponigas materialojn ankaŭ por trejnadoj.

## Poŝamiko (Edukado.net)




La kajereto entenas kolekton de ekzercoj kaj memorigiloj, kiuj pretiĝis laŭbaze de materialoj el la Metiejo kaj Instrumaterialoj de la paĝaro Edukado.net.

**Prezo: 5,30 eŭroj**

## Plena Ilustrita vortaro 2020 (SAT)




Normdona (kaj la plej ampleksa) vortaro de la Internacia Lingvo, funde reviziita kaj ĝisdatigita; preskaŭ 17 000 kapvortoj (kaj ĉirkaŭ 47 000 leksikaj unuoj). Kolektiva verko de ĉirkaŭ 150 kunlaborantoj.

**Prezo: 63,60 eŭroj**

## Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (E@I)




La Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG) estas verko por ordinaraj esperantistoj, kiuj volas detale studi la gramatikon, vortfaradon, skribon kaj elparolon de la Internacia Lingvo. PMEG estas unuavice praktika lernilo, ne teoria verko por lingvistoj. Ĝi provas klarigi la lingvon en facila maniero – kaj la plej bazajn aferojn, kaj tre specialajn detalojn.

**Prezo: 38,00 eŭroj**

**MONATO estas kvalitmagazino por postulemaj legantoj, kiuj volas esti funde informitaj. Jen dek bonaj kialoj por aboni ĝin nun!**




1) Por **MONATO** raportas ne eksterlandaj ĵurnalistoj, sed lokaj esperantistoj, kiuj konas la tieajn fonojn.

2) **MONATO** havigas plej variajn komentojn pri la mondaj novaĵoj.

3) En **MONATO** la intelektularo de la Esperanto-movado diskutas, fojfoje vigle polemikas pri gravaj temoj de la nuntempa socio.

4) **MONATO** estas la magazino en kiu ankaŭ vi povas aperigi viajn komentojn.

5) **MONATO** plilarĝigas vian spektron de interesiĝo, pro aro da nekutimaj temoj prezentitaj en facile digestebla maniero.

6) **MONATO** pligrandigas vian lingvokonon. Ĝi estas redaktita en bona hodiaŭa Esperanto.

7) **MONATO** jam dum 40 jaroj regule aperadas.

8) **MONATO** estas magazino sen amasa reklamo.

9) **MONATO** estas la sola revuo, kiu estas ellaborita ekde la redakto ĝis la forsendo, per la kranioj kaj la manoj de esperantistoj.

10) Per **MONATO** vi vivtenas kaj subtenas prestiĝan eron en la Esperanto-movado.

... kaj 11) **vi kiel nova abonanto nun ricevos MONATO dum 15 monatoj kontraŭ la prezo de nur unu jaro! Mendu ĝin ĉe < www.monato.be> aŭ ĉe la eldonejo:**

**Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen, Belgio.**